Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 4-an de marto 2026 per Zoom

**Ĉeestis** Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Lars Sandbakk, Claude Rouget kaj Marianne Lund.

**1. Aprobo de la tagordo**

La tagordo aprobiĝis kun kelkaj aldonoj.

**2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 21-an de januaro 2025**

La protokolo de la pasinta estrara kunsido aprobiĝis. Komenoj pri la traktitaj punktoj:

- Ni ne havis tempon esplori eventualajn impostajn rabatojn.
- Brønnøysund – Bård estas nun rajtigita subskribi anstataŭ Mario. La afero estas ordigita.

**3. Jarraporto**

La raporto estas ĝisdatigita, sed restas kelkaj punktoj pri ekonomio, kiujn Claude enmetos. Poste la estraro aprobos la raporton retpoŝte.

**4. Jarkalkulo**

La jarkalkulo estas prilaborita de la revizoro. La ĝenerala mona situacio ne estas malbona. Danke al Skagenfondene ni havas pozitivan saldon. Tamen maltrankviligas la fakto, ke multaj membroj ŝajnas ne daŭrigi sian membrecon en 2026.

**5. Landa kunveno**

La landa kunveno okazos rete la 4-an de junio je 18.30-20.30. Bård skribos al la elekta komisiono, ke la nuna estraranoj pretas labori unu plian jaron.

**6. Revua aliro en la Nacia Biblioteko**

Antaŭ la somero Nacia Biblioteko akceptis nian principon kaj faris novan kategorion laŭ nia bezono: Tiel la kopirajto restos ĉe ni, sed ĉiu havos aliron por legi nian gazeton. Momente mankas nur la kontrakto kaj niaj subskriboj. Jardar kontaktos NB.
Ricevonte novajn retpaĝojn por NEL ni diskutu, ĉu ni mem igu niajn revuojn rekte alireblaj tra tiu retpaĝo. Esperanto-Nytt jam enestas nian nunan retpaĝon.

**7. Nordia kunlaboro**

Al la skandinavia kunlaboro aliĝis Finnlando, kaj eble aliĝos Islando. Okazas regulaj kunvenoj.

**8. Riparlaboroj en Esperantonia**

La elektra sistemo estas plibonigita diversmaniere. Plafonaj lampoj ne estas ŝanĝitaj, ĉar tio postulus aliajn, iom ampleksajn prilaborojn de la plafono. La fenestroj ripariĝos kiam ekvarmos la vetero.

**9. Eventualaĵoj**

* Ni aprobis la petskribon al fondaĵo Uhlen, kiun verkis Bård antaŭ la limdato la 28-an de februaro.
* Retmesaĝo pri libroj de Knut Haugen: Li sendu ilin al Esperantonia. NEL pagos la sendokostojn.
* Kurso por komencantoj: Ni atendu ĝis septembro.
* Libroj de Steinar Nilsen: Li liveru la librojn en Esperantonia.

**8. Venonta estrara interkonsiliĝo**

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 23-an de aprilo je 20.30.

Protokolis Marianne Lund